

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFANTA ★

Nova titolo post 1 januaro 1925: „Heroldo de Esperanto“.

Aperas dufoje en la semajno (merkrede kaj sabate). — Prezo de unuopa numero 0.20 sv. fk. aŭ egalvaloro.

Projektoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa  
W.M. Page, advokato, Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
I. Gilli Norta, komercisto,  
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,  
București  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bank-kaj fabrik-  
direktoro, Kaunas.

**N-o 222**  
**6. 12. 1924**

Redakcio:  
Ĉefredaktoro: Teo Jung.  
Redakciaj kunlaborantoj:  
H. Jung kaj M. Butin, L. K.  
Administracio:  
Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo ponomera  
ĉe duonsemajna ekspedado: egal-  
valoro de 0.30 sv. fk., mendita per  
loka poŝtfolio 0.15 sv. fk.;  
ĉe semajna ekspedado (du numeroj  
kune): 0.15 sv. fk.

Abonprezo  
po unucentimetra kolonero egalvaloro  
de 2.— sv. fk. (antaŭpago 1.50 sv. fk.),  
minimuma atenco 5 cm.

**Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa**

### Vojaĝo ĉirkaŭ la terglobo de vaporŝipo „Belgenland“.

#### 1. La ŝipoj en la servo de „Red-Star-Line“.

La kurierŝipoj de „Red-Star-Line“ (Ruĝa Stelo Linio), prezentas ĉiun komforton kaj ĉiun laŭdezinan lukson por la transveturado de la Atlantika Oceano.

La Kompanio akiris sian famon, kaj estas nun dum jam 50 jaroj neriproĉinda servo inter Antwerpen kaj Usono. Ĝiaj klopodoj streĉis ĉiam por la konstanta plibonigo de ĝiaj servoj, tiel rilate al la komforto kiel al la senriskeco sur la maro.

La vaporŝipo „Belgenland“, la juvelo de ĝia ŝiparo, havas kalibron de 27 200 tunoj, estas longa je 212,50 m kaj larĝa je 23,70 m, restas, konsiderante ĝiajn ampleksojn, la oka plej granda ŝipo de la mondo. La „Lapland“, dua unikajo de „Red-Star-Line“ kun longeco je 189 m, estas unu el la plej famaj kurierŝipoj de la Atlantika Oceano kaj havas amplekson je 18964 tunoj. La „Zee-land“, kiu estis speciale dediĉita por la transporto de kajutpasaĝeroj, havas amplekson je 11900 m

al Ameriko. La pakaĵoj povas esti sendataj senpere de la ŝipo al la alilandoj kaj reciproke sen doganista inspektado ĉe la landlimoj.

#### 2. Io pri la „Belgenland“.

La transatlantika vaporŝipo „Belgenland“ estas la plej granda markastelo el la tuta belga komerca ŝiparo; ĝi havas tri ferdekojn, brulas siajn fajrigojn pere de oleo kaj estas movigata per turbinoj.

876 personoj estas sur la ŝipo en la servo de „Red-Star-Line“, el kiuj 80 por la ferdeko (komando, senfadena telegrafo, flagsignalistoj, maristoj) kaj 586 por la „steward's department“ (servistara departemento). Oni havas orkestron, presejiston (por la manĝarkarto kaj la ŝippapero), gimnastikgvidiston, naĝgvidiston, masagiston, kuraciston, barbiron, tajloron, lignajiston, forĝiston, bibliotekiston, lifistojn ktp. La kuireja personaro konsistas el 60 kuiristoj, 14 porkajistoj, kaj 20 panbakistoj. En la maŝinĉambregoj laboras 55 personoj por la moviga, freŝiga, pumpa kaj elektra maŝinaro. Por la hejtakadronoj oni disponas pri 60 personoj, krom tio ankoraŭ 6 elektrostoj, 2 plumbistoj ktp.

En la tolaĵejo troviĝas 8353 dekduoj da litotukoj, kovriloj, manviŝiloj, tablotukoj, tualetotukoj ktp. Ĉiuj ĉi pecoj estas lavataj post la fino de ĉiu vojaĝo!

Ĉiutage oni devas aranĝi 5500 litojn, senpolvigi 1000 kusenojn, lavi 2000 vitrojn, purigi 19705 pecojn da arĝentajo kaj akriĝi 5187 tranĉilojn. Milaj metroj da tapiŝo estas purigataj ĉiutage, kaj ĉiutage la tri lignaj ferdekoj estas froitataj pere de sabloŝtonoj, aniaŭ ol la pasaĝeroj leviĝas je 7.30 horo.

#### 3. La vojaĝo de la „Belgenland“.

La „Belgenland“ forveturadis definitive el la haveno de Antwerpen la 19-an de tiu ĉi monato (novembro) al New York kaj de tie ĝi entreprenos la 4-an de decembro gloran vojaĝon ĉirkaŭ la terglobo.

Estas eble rimarkinde, scii ion pri la listo de provianto, kiun la „Belgenland“ kunportos por tiu vojaĝo, kiu daŭros 143 tagojn. Inter alie:

- 50 000 kg da bovajo
- 30 000 kg da faruno
- 25 000 kg da ŝafajo
- 18 000 pecoj da ĉasaĵo kaj birdoj
- 78 000 ovoj
- 900 000 litroj da lakto
- 1 350 000 litroj da densiĝita lakto
- 5 000 kg da ŝinko kaj lardo
- 1 250 kg da vinberoj
- 12 500 kg da sukero
- 4 000 kg da kafo
- 2 000 kg da fromaĝo
- 7 500 kg da greno
- 1 000 kestoj da pomoj, oranĝoj kaj aliaj fruktoj
- 10 000 kg da freŝaj legomoj ktp., ktp.

Krom la freŝigejoj, la disponeblaj flankeloj de la ŝipo servos kiel magazenoj por tiu ĉi provianto.

La „Belgenland“ vizitos 14 landojn kaj alvenos en 60 urboj.

Remi Van Eynde,

Berchem-Antwerpen (Belg.), Uilbreidingstraat 184.

### Aerveturado.

#### Aerŝipo de triobla grandeco de Z R 3.

Post kunveno de Goodyear Zeppelin Corporation, oni anoncas ke planoj kaj desegnoj por Zeppelin-aerŝipo, en triobla grandeco de Z R 3, estas komencataj en novembro.

La planado de la ŝipo, kiu havos enhavon de 5000 000 kubaj futoj kaj kvaroblan portopovon de Z R 3, estas la unua tasko por D-o Karl Arnstine, planinto de Z R 3, kaj liaj dekdu helpantoj, kiam ili alvenas en Akron de Friedrichshafen, Germanujo.

D-o Arnstine estas vic-prezidanto kaj D-o Hugo Eckener, komandinto de Z R 3, estas direktoro de la Goodyear Zeppelin Corporation.  
W. A. D., Cleveland.

### La rememorigo de la unuaj flugoj de Santos-Dumont.

La 12 novembro estis inaŭgurita en la kampo de Bagatelle en la arbaro de Boulogne apud Paris monumento je la memoro de la dato de 12 novembro 1906, kiam, sub la kontrolo de la Franca Aero-Klubo, la brazila flugisto Santos-Dumont atingis la mondan rekordon de flugado de 21 minutoj kaj 1/2 kaj distanco je 220 metroj.

La premio por ĉi tiu flugado estis kreita de nia fervora samideano, s-o Ernest Archdeacon, kaj la konata industriisto Deutsch de La Meurthe.


Ni utiligas tiun rememoron por konigi al la esperantistaro la rolon luditan de nia eminenta samideano Archdeacon en la historio de la aviado.

### Komerco.

#### La sukera sezono en Rumanujo.

La sukera sezono sin anoncas tre favora, kvankam la rezultato de la sukero-rapoj estas tre malalta kaj verŝajne ne atingos pli ol 10% ĉe la rafinado.

La rikolto nunjara resentas la saman malanon, kiu jam de 3 jaroj malaltigis la sukeran enhavon de la rapoj kreskantaj en la danubaj regionoj.



Interno de la salono por fumantoj sur „Belgenland“.

kaj longecon je 177 m. Ĉiuj estas renomitaĵoj por siaj starebleco kaj reguleco.

Kio kunhelpas multe por agrablighi la restadon sur la ŝipoj de „Red-Star-Line“, estas la atentema servo de eminenta geservistaro. La bonega kuirejo estas de tutaŝtaca gastronomio kaj la surŝipa vivo havas tie karakteron de dolĉa intimeco.

La vaporŝipoj de „Red-Star-Line“ plaĉas, tiel per siaj aranĝoj por la pasaĝeroj kiel per la ĉirkaŭantaĵo, al ĉiuj, kiuj amas la komforton kaj intimecon de la hejmo. Ĉiuj la ŝipoj estas veraj modeloj de pureco.

La „Red-Star-Line“ certigas la servon inter Antwerpen kaj New York, kun haltejoj en Southampton kaj Cherbourg por la transveturado de Eŭropo al Ameriko kaj en Plymouth kaj Cherbourg por la revenoj. Antwerpen, nur 5 horojn rapidvagonare de Paris kaj en rekta interrilato kun grandaj centroj de la kontinento, estas la ideala enŝipighaveno por la pasaĝeroj, kiuj celas vojaĝi



Ĉarma angulo en la ŝipa hejmo sur „Belgenland“.

Konsiderante la grandajn terenojn kulturitajn kun sukero-rapoj, oni povas antaŭvidi rikolton de ĉirkaŭ 10 000 vagonoj. Al ĉi tiu kvanto oni devas alkalkuli ankaŭ tiun de la suker-fabriko Lujeni en Bukovino, kiu ankaŭ komencis labori.

Laŭ fabrikoj oni povas fari la jenan proksimuman tabelon de produkto de rapoj:

| Fabrikejoj Danubiana (Giurgiu, Sascut kaj Roman) | 5 700 vagonoj |
|--|---------------|
| Turnu Magurele                                   | 850           |
| Chitila  | 500           |
| Bod (Bofalul)                                    | 1 500         |
| Zarolani   | 400           |
| Jucica   | 1 000         |
| Crisciatic                                       | 900           |
| Lujeni   | 600           |
| Ripiceni   | 1 200         |

La sukero en polvoreprezentas ĉ. 60% de la entuta fabrikado.

Por resto de la prezoj fiksitaj de la Ministerio por Industrio kaj Komerco oni aranĝos vendejojn en la grandaj centroj de la lando.

## Scienco. Geografio.

### La loĝantaro de la mondo.

Aniĉa kvindek jaroj Francujo kun 38 milionoj da popolo estis la plej homplena lando de Eŭropo. Germanujo sekvis kun 37 milionoj, kaj Britujo estis la tria, kun 30 milionoj, dum Usono havis loĝantaron je du milionoj malpli ol Francujo.

De tiam okazis granda ŝanĝo, kaj anstataŭ unuan tenas Francujo nun la lastan lokon je punkto de loĝantaro. Ĝia nuntempa loĝantaro nur superas po miliono tiun, kiun ĝi havis antaŭ kvindek jaroj, dum tiu de Germanujo nun estas 64 milionoj anstataŭ 37 milionoj, tiu de Britujo 49 milionoj anstataŭ 30 milionoj, kaj tiu de Usono estas efektive 110 milionoj anstataŭ 36 milionoj.

De post 1800 Ameriko estas 22-obliginta sian loĝantaron, kaj de post 1850, tio estas, dum 74 jaroj, ĝi estas 6<sup>1</sup>/<sub>2</sub>-obliginta sian loĝantaron.

La loĝantaron de la tuta mondo oni taksas ĉirkaŭ 1 800 milionoj, el kiom loĝas 500 milionoj en Eŭropo, 900 milionoj en Azio — precipe en Ĥinujo, Hindujo kaj Japanujo, — 150 milionoj en Afriko, 200 milionoj en Nord-kaj Sud-Ameriko, kaj nur ĉirkaŭ 7 milionoj en Aŭstralazio, termino per kiu oni signifas la pacifikajn insulojn.

El „Tit-Bits“ trad. Leslie E. Thomas.

### Mineralogio.

#### La plej granda gemo.

En muzeo de Chicago, oni elmontras blankan topazon, kiu pezas naŭdek funtoj. Oni diras, ke tiu ĉi estas la plej granda, karega gemo. La gemo sufiĉas por fari el ĝi 205 120 unukaratajn ringojn

W. A. D. Cleveland.

## Esperanto kiel ĵlara telegraflingvo.

### Letero de la Komerca Ĉambro de Paris al ŝtata subsekretario de Poŝto kaj Telegrafo.

(La sekvanta letero, redaktita de s-o André Baudel kaj akceptita de la Komerca Ĉambro de Paris, estas adresita al la ŝtata subsekretario de Poŝto kaj Telegrafo.)

Sinjoro Ministro, ni havas la honoron atentigi vijn je la sekvanta rezolucio unuvoĉe akceptita en la 5-a Kunsido de la Ligo de Nacioj la 20 septembro:


„La kunsido rekomendas, ke la ŝtatoj, membroj de Ligo de Nacioj, koncesiu al Esperanto la traktadon kaj la tarifojn de vivanta lingvo uzata en la rilatoj telegrafaj kaj radiotelegrafaj kiel praktika helpa lingvo en la internaciaj interkomunikadoj apud la naciaj lingvoj uzataj, kaj altiras la atenton de la organizacio de la komunikado kaj trafiko al tiu fakto.“

Tiu ĉi rezolucio estas akceptita sekve de raporto voĉdonita de la 3-a kunsido koncerne al Esperanto kiel internacia helpa lingvo, rezolucio kaŭze de raporto laŭ enketo de nia Komerca Ĉambro kaj decido de 9 februaro 1921.

La Komerca Ĉambro de Paris estas speciale kontenta pri la sukceso, kiu decidigis la Ligon de Nacioj, kaj estos dankema, se la franca administracio de Poŝto kaj Telegrafo tuj disponos pri apliko de la unuvoĉa rekomendo de la Ligo de Nacioj en Francujo kaj ĉesigos la nenormalan

staton, kiu konsideras la telegramojn en Esperanto telegramoj en interkonsentita lingvaĵo, ĉar tiu lingvo (Esp.) estas ofte uzata en la komerc kaj de la specimenaĵoj fojro kiel internacia lingvo en la interrilatoj kun la eksterlando. — La Komerca Ĉambro de Paris estus do feliĉa, se oficiala ordono donus al Esperanto la favoron esti traktata normale kiel la vivantaj lingvoj en la interna servo, kaj se komunikoj al la Unuiĝo Telegrafa Universala montrus al ĉi tiu, ke Francujo estas preta apliki tiun agon en la internacia trafiko akorde kun la aliaj landoj, kiel jam faris dek ŝtatoj de Eŭropo, Ameriko kaj Azio antaŭ la rezolucio, kiun ĵus prenis la Ligo de Nacioj.

Bonvolu akcepti ktp.



Transatlantika vaporŝipo „Belgenland“ forlasanta la havenon de Antwerpen.

## La Deksepa en Genève

3-7 aŭgusto 1925.

La Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado decidis akcepti la inviton de la Svisa Esperanto-Societo kaj okazigi la XVII-an Universalan Kongreson en Genève.

### Dato.

La C. K. fiksas la daton de la kongreso je komenco de aŭgusto (5 ĝis 7) laŭ la plej ĝenerala deziro de la esperantistaro.

### Somera universitato en Esperanto.

Laŭ arango kun la Internacia Universitato fondita de s-oj Otlet kaj Lafontaine en Bruselo, okazos en Genève internacia universitata semajno en Esperanto de 1-7 aŭgusto 1925. Konataj profesoroj el diverslandaj universitatoj prelegos en Esperanto pri gravaj temoj de internacia juro, filozofio, filologio, Historio de Esperanto, pedagogio kaj psiko-analizo. En la du lastaj kampoj okazos prelegoj de la famaj psikologoj Prof. Pierre Bovet kaj Charles Baudoin, kiuj ambaŭ lernis nian lingvon kaj nun parolas ĝin flue.

### Provizora programo.

Sabato, 1 aŭg.: Komenco de la Somera Universitato.

Dimanĉo, 2 aŭg.: Diservoj. Ĝardenfesto, Renkontiĝo.

Lundo, 3 aŭg.: Lekcioj. Vespere solena malfermo de la XVII-a.

Mardo, 4 aŭg.: Laborkunsido. Ŝipekskurso sur Genève-a Lago.

Merkredo, 5 aŭg.: Lekcioj. Prelegoj. Vespere teatro.

Ĵaŭdo, 6 aŭg.: Lekcioj. Prelegoj. Vespere Balo.

Vendredo, 7 aŭg.: Fermo de la kongreso. Fino de la kursoj.

Sabato, 8 aŭg.: Ekskursoj al svisa montaro.

### Kotizo.

La C. K. decidis fiksi unu solan kotizon por ĉiuj kongresanoj sen diferenco pri landoj. Ĝi estos 25 svisaj frankoj, sed organizitaj esperantistoj, kiuj regule kotizas al nia Universalas Esperanto-Asocio, ricevos rabaton de 20% kaj pagos nur 20 svisajn frankojn. Junuloj (malsupre 20 jaraĵ), membroj de UEA, pagos nur 15 svisajn frankojn. Frua aliĝo estas rekomendata por helpi la aranĝon.

### Turistaj biletoj de UEA.

Por la kongresanoj, kiuj dezirus eviti ĉiujn malfacilaĵojn de mendo, trinkmono, biletaĉetado ktp., UEA aranĝos por siaj membroj ne nur karavanojn, sed turistajn biletojn entenanajn ĉiujn elspezojn de kongresano dum unusemajna restado en Genève, ekzemple

kongreskarto, somera universitato, teatro, balo, ŝipekskurso, unusemajna loĝado kaj manĝado en tre bona hotel-pensio, ĉiuj trinkmonoj enalkulitaj

sv. fk. 140.— (bileto verda)

kun bileto II-a klasa Londono—Genève—Londono

ft. sterl. 12.10

ĉio sama kun loĝado kaj manĝado en unuagrada hotelo ĉe la lago (ĉiuj trinkmonoj enalkulitaj)

sv. fk. 200.— (bileto flava)

kun bileto II-a klasa Londono—Genève—Londono

ft. sterl. 15.—

ĉio sama kun loĝado kaj manĝado en la plej luksa hotelpalaco ĉe la lago kun trinkmonoj enalkulitaj

sv. fk. 300.—

kun bileto II-a klasa Londono—Genève—Londono

ft. sterl. 20.—

ĉio sama kun loĝado kaj manĝado en modesta studenta pensio (trinkmonoj enalkulitaj)

sv. fk. 110.— (bileto ruĝa)

kun bileto III-a klasa Londono—Genève—Londono

ft. sterl. 9.10.

Al la mendintoj de tiuj turistaj biletoj, per zorgo de UEA, estos rezervata la plej bonaj hoteloj kaj pensioj kaj la plej bonaj sidlokoj en teatro. Ĉar la nombro de tiuj biletoj estos nepre limigata je apenaŭ kelkcentoj, estas rekomendinde tuj mendi ilin ĉe la „Kongresa Oficejo“. Pago en tri partoj estos akceptata, la unua tuj, la dua en februaro, la tria en majo.

Tiu sistemo ne celas favori riĉulojn, sed nur la saĝe fruajn aliĝintojn. Kontraŭe la mendintoj de tiuj biletoj elspezos entute por ĉio la minimumon da mono dum la ceteraj riskos pagi multe pli altajn prezojn pli poste por malpli bonaj lokoj. Rapidu do mendi! Poste estos tro malfrue.

### Loĝado.

Ĉar Genève estas tre plena en somero, estas necese rezervi ĉambrojn tre frue antaŭe. La Loka Komitato sendos al la aliĝintoj adresojn kaj prezojn de loĝejoj por ke ili antaŭmendu mem laŭ sia deziro.

### Manĝado.

Estas utile memori, ke Genève tute ne estas granda urbo. Nur centridekmil loĝantojn ĝi havas. Kvaronhoro sufiĉas por piediri de la hoteloj aŭ pensioj la plej malproksimaj al la kongresejo. Estas do rekomendinde loĝi pensione, t. e. manĝi samloke por ŝpari monon, ĉar aparta manĝado

## Sankt-Niklas kaj la telefono.\*)

Germane de Viktor Blüthgen (El: Im Kinderparadies. Kinderlieder und Reime. Gotha, Perthes.) Esperantigis J. Zschepank.

Sankt-Niklas pensas: Kia ĝu' La telefonparolo, Ni aŭdas je cent mejloj — nu, Mi helpas al popolo! Por la infanoj sur la ter' Aranĝos mi belsonan Konvenan al la Kristvesper' Fadenon telefonan.

Li pensis, faris. En rapid' Novajo disvastiĝis, De l' infanaro kun avid' La telefon' uziĝis. Klingling, halo' — klingling halo!' „Sankt-Niklas, mi tre peias!“ „Jen Niklas — kiu tie?“ Ho, Nun ili kvazaŭ vetas.

Tri pupojn, belvestitajn jam — Biciklon — kubludilon — Ĉevalon — kaj en festonam' Alportu veturilon! Mielokukon — aŭdu nur: Bestojn kun bovino! — Tri tagojn daŭras la plezur', Jen Niklas diris: fino!

For, al diablo la klingling, Al mi la kap' varmigas. Dum tag' kaj nokto staras mi — Parolo ne finiĝas. Donacas mi laŭ mi a vol', Dezirojn mi jam konas. Kaj se ne plaĉas la simbol', Neniu ĝin redonas!

## Sankta Nikolao-vespero.

Estas malvarma vetero. La blankaj neĝeroj dolĉe malsuprenŝvebas el la griza ĉielo kaj kovras la stratojn, la fenestrokadrojn kaj la elektrajn lanternojn en la urbejo per virga neĝo.

La luksaj veturiloj kaj la hele lumigitaj tramoj penplene sin movas tra la neĝokovro. Ĉiu rapidas hejmen, ĝoje portante grandajn aŭ malgrandajn paketojn ĉiuspacajn. Estas hodiaŭ la ĉiujara vespero (5 decembro), en kiu la holandanoj ordinare feliĉigas unu la alian per surprizoj.

En mallarĝa apud strato regas trankvileco kaŭze de la nuna frosta vetero. Nur malmultaj piedsigoj vidiĝas en la neĝtapiŝo. Tiun ĉi malriĉan kvartalon oni ordinare evitas.

Ununura gaslanterno d'issendas siajn palajn radiojn tra antikva pordego, en kiu la alportita neĝo fandiĝas, kvazaŭ estus pluvinte. Tra tiu pordego vidiĝas vico da grizaj dometoj; mallarĝaj vojoj kondukas, laŭlonge de la forlasitaj ĝardenetoj, al la senkoloraj pordegoj. Nur el malmultaj fenestroj brilas lumeto; la petrolo estas multekosta kaj la enspezoj malmultaj pro la senlaboreco.

En la maldekstra angulo de la korto, pala laboristo staras en la antaŭkoridoro, rigardante al la pordego, kvazaŭ li atendas ion. Lia fervora juna edzino preparas sin al festo, t. e. ŝi vestas la multnombrajn infanojn per iliaj plej belaj vestaĵoj. Ŝi estas dirinta al ili, ke hodiaŭ vespere eble la Sankta Nikolao venos.

Estas la unua fojo, kiam tiu festo okazos en ŝia dometo. Neniam la gepatroj estis sukcesintaj ŝpari ian por ĝojigi siajn dek infanojn. Iliaj zorgoj estas grandaj, precipe dum la nuna tempo, ĉar la edzo ne havas laboron.

La tre okupata patrino bone memoras nun, kiel ŝi mem iam ludis la rolon de Sankta Nikolao por la infanoj de sia mastrino, ĉe kiu ŝi multajn jarojn antaŭ sia edziniĝo honeste kaj fidele servadis. Kaj hodiaŭ, post tiom da jaroj, unu el la filoj de ŝia jam mortinta mastrino estas vizitonta ŝian dometon kaj ŝiajn infanojn.

Dume, proksimume je la oka, unu sinjoro kaj sinjorino, akompanata de servistino, eliras tramon, trenante grandan korbon da aĵoj. Post kelkaj minutoj ili eniras singardeme en la pordegon kaj haltas en la mallumo. La servistino avertas per signoj la atendantan viron, starantan sur la pordego, post kiam tiu ĉi tuj malaperas en la dometon.

La sinjoro rapide alivestiĝas, por ke neniu rekonu lin, kaj dume la servistino, helpate de la sinjorino, ŝanĝiĝas en „nigran serviston“.

Nun, trans la neĝo Sankta Nikolao kaj liaj helpantoj iras al la dometo kaj frapetas al la malnova pordo. La patro malfermas ĝin, kvazaŭ mirigate kaj petas lian „Moŝton“ eniri. La laborema patrino senprokraste alŝovas du el la simplaj seĝoj kaj vokas la infanojn. Tiplene kaj konfuzite ili alproksimiĝas al la fremdulo, dum la plej malgrandaj infanoj ekkaptas la jupon de la kara patrino.

Sankta Nikolao rakontas, frotetante sian longan blankan barbon, ke li bedaŭrinde ne povis veni pli frue kaj ke li estas iomete laca. Li kviete eksidas sur seĝo por trankviligi la infanojn Li afable demandas, ĉu eble ili lernis festkantojn en la lernejo. Ĉiuj kapijas kun brilantaj okuloj, kaj la plej malgrandaj rekuragiĝintaj en du vicoj ekkantas per laŭtaj voĉoj kelkajn konatajn kantojn.

\*) Estas dirite, ke la antaŭvespero de la tago de S-ta Nikolao (6. 12.) la sanktulo vizitas kiel „kristnaska viro“ la bonajn infanojn por alporti al ili ludilojn kaj bongustaĵojn.

en restoracioj estas ĝenerale multe pli kara kaj Genève ne estas urbo kun multaj restoracioj krom la hoteloj mem

**Senpaga vizo de pasporto.**

La Svisa Registaro informis la organizantojn de la Kongreso, ke la eksterlandaj partoprenantoj ricevos senpagan vizon de sia pasporto prezentante sian kongresan karton al la svisa konsulo en sia lando. Sed jam multaj diverslandanoj tute ne bezonas vizon por Svislando. Ni publikigos la liston de tiuj landoj poste.

**Turismo.**

La Svisa Turisma Oficejo eldonos belan gvidlibron de Svislando kun ilustraĵoj, kiun oni povas jam antaŭe peti de Schweiz. Verkehrzentrale, Löwenstrasse, Zürich, Svislando, kie estas ankaŭ ricevebla listo de svisaj hoteloj kun prezoj. Esperantistoj dezirantaj restadi sur montoj devos laŭeble antaŭmendi ĉambron, ĉar aŭgusto estas plena sezono.

Ciam skribu en Esperanto!

**Klimato.**

La klimato estas varma en Genève dum aŭgusto. Nur tiuj, kiuj volus poste restadi sur montoj, bezonas alporti varmajn vestojn aŭ mantelon kaj altajn ŝuojn.

Ĉiujn korespondantojn kaj mensendojn ne direktu al personoj, sed adresu senescepte al XVII. Universala Kongreso de Esperanto 12, Bd. du Théâtre, Genève (Svislando).

# Kroniko.

Por servi nian legataron per ĉiam aktuale, fidinde kaj kompleta informaro, ni bezonas scigojn (sur postkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administrativaj aŭ privataj scigoj) pri ĉiu flanke nova el la esp. movado, kondiĉoj rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj).

**Eŭropo.**

**Aŭstrio.**

Wien. La gvidadon de la pacifista sekcio en la kadro de Esp. Organizo de Postenhavanaj de Urbo Wien prenis sur sin s-o sup. kalkul. kons. Edmund Weiler, estrarano de Aŭstria Porpacca Societo.

**Finnlando.**

Persistema esperantisto estas finna surdmutulo A. Pudukka, kiu en du jaroj tradukis en Esperanto la tutan Melnovan Testamenton (kun apokrifaj ĉapitroj) kaj kopiis laŭ presita traduko la Novan Testamenton. Li faris la grandan laboron nur por si mem, ĉar li komprenas, ke lia traduko (pro lingvaj eraroj) ne taŭgas por presigo. Ĉar li jam posedis Biblion en ses lingvoj, li volis havigi la sepan, esperantan, per propra laboro. La tradukoje, kiun li mem bindis, ampleksas pli ol du mil dense skribitajn paĝojn. H. K.

**Francujo.**

Monigeron. 19. 11. parolado de s-o Delanoue por fondi grupon.

Paris. Kurso en Lernejo de Supera Komerca Instruado por Fraŭlinoj.

**Korekto.**

Oni informas nin, ke la 1000.— fr. fk. voĉdonitaj de Komerca Ĉambro de Paris (komp. ET 219) ne estas subvencio por instruado de Esp. al ĝiaj oficiistoj, sed subvencio por la Komerca Konferenco.

**Germanujo.**

Chemnitz, 30. 11. La juna sed fervora esp. grupo en Kemtaŭ aranĝis prop. vesperon, kiun vizitis areto da chemnitaj gesamideanoj. Salutate en Dittersdorf, akompanite ira ĉarma atilunarbano, akceptite en aparta ĉambro de agrabla gastejo, la gastoj travivis belan dimanĉvesperon kun kantoj, serĉado ktp.

Dresden. En monata kunveno de loka unuiĝo de GEA, 26. 11. la nova prez s-o J Karsch raportis pri la morto de tri fidelaj gesamideanoj: f-lino Heyne, kantoro

Kaj nun la „sanktulo“ malfermas grandan sakon, disjetas multajn priprokuketojn inter la infanojn, kiuj sin jetas sur la regalajojn. Forgeŝante ĉiun timon, ili ĝojegas pro la alveno de la neatenditoj.

Sankta Nikolao laŭdas la infanojn, rekomendas al ili bone lerni kaj petas sian serviston malfermi la grandan korbon Ĉies okuloj scivole direktas sin al ĝi, kaj jen Sankta Nikolao enmanigas al la ĝuanta patrino plenan laktujon, skatolon da ĉokolado, koverton da mono kaj al la miranta patro sakon da tabako kaj novan pipon.

La „nigra servisto“ ĉerpas el la korbo multajn pakajojn kaj, voĉe legante la nomojn de la infanoj, transdonas ilin al sia mastro, kiu kun respekto fordonas ilin al la geknaboj. Rugiĝante tiuj ĉi akceptas la donacojn el iliaj manoj kaj, forgeŝante ĉion, unu post la alia tuj malfermas la strangojn paketojn. Preskaŭ ĉiuj ekkrias pro ĝojo.

„Rigardu, patrinoj, ĉevaloj!“

„Kaj mi havas belan pupon, kiu povas dormi!“

„Ĉu vi jam aŭdis mian blekantan saŭdion, paĉjo?“

„Kaj jen vagonaro, kiun mi tiel deziris!“

„Rigardu! Rigardu!“

La gepatroj ne povas kontentigi ĉiujn por admiri la ludajojn kaj la frandaĵojn.

„Sed nun, karaj infanoj,“ diras S-ta Nikolao, „mi devas foriri, ĉar mi havas ankoraŭ multe por fari.“

La infanoj laŭte adiaŭsas lin, kaj tuj rekomencigas la festo per pli granda bruado.

S-ta Nikolao ŝtelirante malaperis en la malhumon de la antikva pordego.

J. Ravestein jr.

em. Schimmel kaj Prof. D-o Bernhard. (Cetera parto de la raportoj nelegebla.)

Heidelberg. 27. 11. komencis esp. kurso en Rhein. Handelslehreanstalt (komerca lernejo), gvid. ĉefinstruisto Scherzinger. Partoprenas 16 p.

München. En 7 kursoj ĉi tie nun estas instruataj entute ĉ 100 personoj. La radiokurso de s-o Koch vigligas multloke la intereson por Esp.

**Japanujo.**

Tutkjuŝua Esp. Ligo

estas fondita antaŭ nelonge. Apartenas al ĝi 15 grupoj en diversaj lokoj de insulego Kjuŝiu. Nova kurso komenciĝis en Kjuŝiu Imperia Universitato, gvidas sinjoro Fujisava. Por urbanaj komenciĝis elementa kaj mezgrada kursoj, gvid. Prof. Ohohima kaj s-o Fujisava. En venonta somero okazos Esp. Karavano ĉirkaŭ la insulego Kjuŝiu.

**Litovujo.**

Panevėžys. Kun alveno de l' vintro nia agado plivigligis. PEA malfermis 5 esp. kursojn: 2 litovingve por seminarianoj kaj militistoj, gvid. s-o Pogoreckis, hebrelingve por gimnazianoj de l' hebrea gimnazio kaj iudlingve por laboristoj, gvid. s-o Taic, kaj ruslingve por abiturientoj de l' rusa gimnazio, gvid. f-lino B. Traub. En ĉiuj 5 kursoj enskribiĝis kaj lernas Esperanton 130 pers. PEA.

**Polujo.**

Boryslav. En Boryslav kaj Drohobycz okazis la 16. 11. prelegoj de Prof. Kronenberg, laŭ invito de la prez. de grupo en Boryslav, s-o Czechowski. (Resto de l' raportoj nelegebla.)

Bydgoszcz. La komandanto de pola polico ordonis registradon de ĉiuj esp. polio oficiistoj sciantaj Esperanton aŭ dezirantaj ĝin lerni. Simila ordono aperis ankaŭ en aliaj polaj urboj kaŭze de la baldaŭ okazonta Int. Polica Kongreso, dum kiu oni studos la statistikojn ĉiulandajn pri Esp. Pola Esp. Servo.

Lublin. Inter la klerigaj kursoj por plenkreskuloj aranĝataj de kooperativa societo komenciĝos ankaŭ kurso por Esp., gvid. s-o Zawada. — Pola Esp. Societo aranĝis la 15. 11. maskifeston en ĉambrego de kino „Corso“ kun kontentiga sukceso. PES.

Warszawa. Dum la 16-a en Wien fondiĝis Int. Studenta Esp. Asocio, kies sidejon oni decidis transdoni al pola ĉefurbo Warszawa. Dume ekzistis la estraro el 4 membroj konsilantoj: s-oj Migliorini (Italujo), Grimme (Aŭstrio), Gunczew (Bulgario), Esaki (Japanujo). La 26. 11. okazis en Warszawa en aŭditorio de universitato, afable disponigita de la rektoro Prof. Kryszalowicz, kunveno, en kiu oni elektis aktivan ĉefestraron: Trochimowski prez., Szpenczkopf vicprez., Ignacy Koss sek. kas., kies adreso estas Warszawa, Leszna 28 m 15. PES.

Warszawa. La polikomandanto en Warszawa ordonis la statistik-komparon de polianoj: kaj oficiistoj de la Ofico Internaj kiu konas Esperanton aŭ volas lerni ĝin — M. Gr. (Komparu ankaŭ la raporton sub Bydgoszcz.)

**Ruslando.**

Bebrujsk. Fondiĝis org. kom. por disvastigo de Esp. (rez. Povoroznik, membroj Gajdukeviĉ kaj Valkovski). Du kursoj en lernejoj (50 kaj 55 glerneanoj), gvid. Gajdukeviĉ kaj Valkovski. Mankas lernolibroj kaj legaĵoj. Bv. sendi al N. Povoroznik, Vojenaja Prokuratura, 5 korp., Bobrujsk.

Tambov. Esp. kursoj en vagonaj fervojaj metiejaj por ĉ. 40 gleraristoj, gvid. An. Volohov. Oni eldonas murgazeton „Fervoja Esperantisto“. (Manuskripto preskaŭ nelegebla pro stranga skribmaniero.)

**Esperanto en Lernejo.**

Pri kursoj en lernejoj legu en la Kroniko, sub „Francujo, Paris“, „Germanujo, Heidelberg“, „Japanujo“, „Litovujo“ kaj „Ruslando, Tambov“.

## Radio.

**Esperanto-kurso en Vox-Haus.**

En nia sciigo pri la esp. kurso en Vox-Haus (ET 220) troviĝis skribarero. La ondo por la kurso ne estas 450, sed 505, kiel anoncite en ET 219. La kurso okazas ĉiusabate, ptm. inter 4.00 ka 4.50 h. E. G. B.

**„Mi ne komprenas vian lingvon.“**

La direkco de la radiostacio Breslau respondis al eksterlandano, kiu skribis en Esperanto al la stacio, en lingvoj franca kaj angla: „Bonvolu skribi viajn dezirojn en angla aŭ franca lingvo. Ni ne komprenas vian lingvon.“

Ĉu ĝis nun neniu el la breslaŭaj samideanoj informis la radiostacion pri Esperanto?

**Radiostacio en Leningrad.**

Depost 15 nov. en Leningrad funkcias radiostacio por ĉiutaga disaŭdigado de informoj, paroladoj kaj koncertoj al organizantoj kaj privatuloj, posedantaj radioakceptilojn. H. F.

## Alvokoj.

**Vintra kunveno en Annaberg (Erzgeb.)**

La „Esperanto Societo Annaberg-Buchholz“ invitas per tio al amika vintra kunveno en sia belega montarurbo, sabato la 31. 1. 1925 kaj dimanĉon la 1. 2. 1925.

Programo: Sabato: senĝena kunesto. — Dimanĉo: Irado tra la urbo kaj sportado sur sportejoj.

Se eble, kunportu sportilojn! Ni atendas gesamideanojn el Meza Germanujo kaj precipe el Ĉeĥoslovakio! Kiu deziras litemendon, tiu sendu antaŭe monon. Venu kaj ĝoju!

Anoncojn akceptias Lehrer Fritz Krämer, Annaberg (Erzgeb.), Saksujo.

**Esperanta Ligilo.**

Dum dudek jaroj la reliefpresita gazeto „Esperanta Ligilo“ faras senmombrajn servojn al siaj blindaj legantoj, kies nombro konstante kreskas. La gazeto, kiu en la komenco estis luksaĵo por nur kelkaj blinduloj, nun fariĝas necesajo por pli ol mil, kiuj troviĝas en pli ol tridek landoj

kaj en ĉiuj sociaj rangoj. Senbrue la blinduloj pli kaj pli vaste uzas la tutmondan lingvon por korespondado kaj por ricevi valorajn sciigojn. Estas ĉefe ja malriĉaj kaj laboremaj blinduloj, kiuj profitas plej multe la informojn kaj kuraĝigon de la Ligilo, tial oni bezonas ankoraŭ peti financan helpon de la bonvidaj esperantistoj. Nuntempe ni treege bezonas donacojn por pagi la preskalkulon de la venonta jarkon. Dankeme mi kvintancos ĉiun donacon.

W. Percy Merrick, Kasisto de „Esperanta Ligilo“

Penso, Shepperton-on-Thames, Anglujo.

**Sukceso en bankoficistaj randoj.**

La subskribinto sukcesis interesiĝi pri nia movado la gvidanton de „Deutscher Bankbeamten-Verein“ (Germana Bankoficista Asocio), s-on Fuerstenberg, kiu samtempe estas membro de „Reichswirtschaftsrat“ (Regna Ekonomia Konsilantaro), do grava persono. Sekve de tio s-o F. subtenas Esperanton kaj pripensas ĝian enkondukon en la programon de „Banksocietaj Prelegoj“ de GBA. Kiel eldonanto de „Bankoficista Gazeto“ li represigis raporton pri nia fakkunsido dum la XVI-a kaj akceptis artikolon pri Esp. en bankoj. Mi klopodas, ke ĉiu plua eldono de la gazeto enhavu artikolon aŭ sciigon pri nia afero kaj tial petas la bankakanojn, ĉu estrojn, ĉu oficiistojn, provizi min je informoj pri la apliko de Esp. en bankaj aferoj. Plue mi kolektadas adresojn de samideanoj kaj Esperanton favorigantaj bankakanoj. Jam nun mi disponas je pli ol 120 adresoj el 22 landoj.

Helpu ĉiu al progreso!

Karl Fischer, Berlin-Halensee, Kurfürstendamm 137.

## Nekrologo.

**Fidela ĝis la morto.**

La senioro de la germana esperantistaro, kantoro em. Wilhelm Schimmel

mortis en Dresden la 15 novembro, tri tagojn post sia 95a naskiĝtago.

Dum 25 jaroj li servis al nia afero, konvinkita pri ĝia fina venko neelcegeble ĝin propagandante. Lia ideo estis, ke malgrandaj infanoj de la 4a ĝis la 6a jaro ludante lernu Esperanton. Li ellaboris specialan sistemon por tio kaj mem sukcese ĝin provis en kelkaj dresdenaj infanejoj (Kindergärten). Arde li deziris la realigon de sia kvazaŭ-vivocelo: esperantista infanejo. Pliie li laboris ĝis la lastaj vivomomantoj pri esp. „fibro“ (alfabelibro kun bildoj) kaj sukcesis, ĉi tiu ĉi tiun verkon, sian „korinfanon“, kies precigo estas esinta por li meditebla ĝojo.

Esintie dum multaj aŭtun-semajnoj tre malsana kaj heroe suferinte fortelajn dolorojn, li lastatempe fariis ion pli bone kaj festis, ĝis la 11-a vespere, sian lastan naskiĝtagon kune kun ĉiuj gefiloj kaj genezoj. La antaŭan vesperon vizitate de dresdena samideano, li mem komencis la interparoladon en Esperanto kaj relative vigle balabalis.

Nun li ripozas, kaj ni funebnas lin perditie, sed lia ĉiutempe afabia maniero, lia laboroĝojo por Esperanto daŭre restos en nia memoro.

La GEA-filio Dresden antaŭ tri jaroj oficiale festis la 90-an naskiĝtagon de s-o Schimmel kaj fluokaze proklamis lin, kiu antaŭ pli ol 20 jaroj ĝin kunfondis, sia honora membro. Ĉe lia enterigo la anstataŭa prezidanto de esp. filio Dresden, D-o H. Arnhold, german- kaj esperantolingve esprimis al la mortinto ĉiaman dankon de la esperantistoj.

Por GEA-filio Dresden: J. Zschepank.

## Bibliografio.

Klucz do Esperanta. (Pola-Esp. ŝlosilo), 48 p., 11x14,5 cm. Eldonejo „Esperantista Voĉo“, Jaslo, Pol. Prezo ne montrita.

Enhavas koncizan gramatikon, la tabelon „La malbela anasido“ kun klerigoj, esp.-polan vortaron kaj „La Esperon“ en esp. originato kaj pola traduko. Rekomendinda al ĉiuj propagandistoj en pollingvaj landoj.

Index to the English Words contained in the Esperanto-English-Dictionary of Edward A. Millidge. Compiled by George Gordon. (Indekso de anglaj vortoj entenataj en la Esp.-Angla Vortaro de E. A. Millidge), 160 p. Kartonita. Prezo ne montrita. Eldonejo Stead's Publishing House, Bank Buildings, Kingsway, London.

Gvidlibro tra Salzburg, urbo kaj lando, kun aldonoj pri kelkaj ekskursoj en najbarajn landojn. 32 p. kaj kovrilo. Prezo 0,50 or-mk. Havebla de Salzburga landestraro de Aŭstria Esp. Delegitaro.

Pio X-a. Reliefbildo, eidonia de Int. Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE).

**Gazetoj.**

- Itala Esperanta Revuo, S. Vito al Tagliamento, nov.
- Esperanto, Genève, nov. Kun unua Kongresa Bulteno.
- La Semisto, Sabadell, nov.
- La Paco, organo de Otani Daigaku Esp. Grupo ĉe Otani Univ. Kioto, Jap., okt. Manskribita gazeto.
- Litova Sielo, Kaunas, okt.
- Esperantista Junularo, Leipzig-Leitmeritz, 15. 11.
- Aŭstria Esperantisto, Korneuburg b. Wien, nov.
- Sennaciulo, Leipzig-Stötteritz, 27. 11.
- La Movado, Paris, nov.-dec.
- La Marto, Heida, nov.
- Espero Katolika, Paris, nov.
- Holand. Esperantisto, 22. 11.
- La Verda Lumo, Shanghai, majo-junio.

**Gazetaro.**

- La Caravane, Gajillac-sur-Tarn, nov. Kun esp. aldono.
- I.T.F. (Organo de Int. Transportlaborista Federacio), Amsterdam, nov. Art. „Esperanto kiel helpilo en nia batalo“.
- Volkszeitung, Bromberg, 24. 10., 7. 11. Esp. angulo.
- Sudetendeutsche Tageszeitung Prag, 21. 11. En art. mencio pri esp. Int. Radio-Asocio. — 25. 11. Art. pri la senioro de l' esperantistoj s-o Schimmel.
- Der Deutsche Rundfunk, Berlin, 25. kaj 30. 11. Kun daŭrigoj de esp. kurso.
- Deutsche Kultur-Zeitung, Berlin, 5. 10. En sia unua numero ĉi tiu sendependa organo por laŭplana kulturrenovigo“ en la ĉefartikolo rekomendas ankaŭ mindingvon.
- Siebingbergs-Zeitung, Honnef, Germ., 22. 10. Art. pri esp. periodo en metilhelpista unuiĝo.
- The Yorkshire Observer, 26. 11. Granda tagjurnalo kun esp. angulo, en kiu rekomenda artikolo pri ET esp. „Heroldo de Esperanto“.
- Nachrichtenblatt, Koblenz 27. 11. (Gazeto eldonita de la franca gazetarservo.) Pri ET kaj loka esp. grupo.

**Importado kaj eksportado.**  
**Komercaĵoj el tutmondo.**

Grenoj, legomoj, vinoj, kafo, sukeroj, kakao, aŭtomobiloj, skribmaŝinoj, fruktoj, peklaĵoj, ktp., ktp.

Oni akceptas reprezentadojn de ĉiu eksterlanda firmo, kiu volas komerc-rilatojn en Portugalujo.

Rilatoj per Esperanto.

**Ferreira & Ferreira, Lda.**  
 Rua da Prata, 59—3.  
 Lisboa Portugalujo

**Eksporto.**

**Maŝinoj por prilaborado de lado.**

**Speciala produktado.**

Tabulotondiloj  
 Cirklotondiloj  
 Rondigmaŝinoj  
 Bordenmaŝinoj  
 Kombinitaj maŝinoj.

**K. Urbanovsky, s. so. r.**  
**Rosice apud Brno, Ĉeĥoslovakio.**

Korespondado: esperante, angle, ĉeĥe, france, germane, hispane, itale ktp. —  
 Por kelkaj ŝtatoj ni serĉas ankoraŭ reprezentantojn.

**FER-MAGAZENO**

ŝraŭboj ĉiuspecaj, dratstiftoj.

Ekstremaj prezoj.  
 Postulu oferton!

**Hermann Dix, Zeulenroda**  
 Turingio Germanujo.

**XVII-a Univ. Kongreso de Esperanto en Genève.**

**Administrataj informoj:**  
 Kongresa kotizo:

25 sv. fk., por anoj de UEA 20% da rabato: 20 sv. fk. por junuloj (ĝis aĝo de 20 jaroj) anoj de UEA 15 sv. fk.

**Sparkonto:**

Por faciligi la partoprenon de la kongreso al la finance ne fortaj samideanoj, la Kongresa Kaso malfermas sparkonton en svizaj frankoj. Pri ĝi la kongresano povas decidi laŭ sia volo; estas akceptataj enpagoj de 10 sv. fk. laŭ taga kurzo en ĉiu fremda mono.

**Turistaj biletoj de UEA:**

Kvar diversaj tipoj, enhavas: la kongreskotizon, la bileton por la somera universitato, balo, teatro, ĉekurso, unu-semajnan loĝadon kaj manĝadon (kun ĉiuj trinkmonoj).

Malkara simpla: Meza: Unuaranga: Luksa:  
 sv. fk. 110 — 140 — 200 — 500 —  
 Kun vojaĝa bileto de London—Genève—London:

III-a klaso: II-a klaso: II-a klaso: II-a klaso:  
 fi. steril. 9.10.0 12.10.0 15.0.0 20.0

La manĝado kompreniĝas por tri manĝoj: matenmanĝo, tagmanĝo kaj vespermanĝo, sen vino.

**Pagmaniero:**

Ĉiuj pagoj al la XVII-a Kongreso devas esti sendataj al Universala Kongreso de Esperanto, 12 Boulevard du Théâtre, Genève. Laŭ interkonsento de UEA ĝiaj poŝteĉekontoj en Ĉeĥoslovakio, Germanio, Pollando, Svislando povas esti utiligitaj.

Posteĉekonto 79236 Praha  
 Posteĉekonto 19076 Warszawa

Posteĉekonto 90850 Frankfurt am Main  
 Posteĉekonto Genève 1.2510

Estas akceptataj ĉiuj bankbiletoj fremdaj, ĉeĥoj ktp., kalkulataj laŭ taga kurzo. Skribante al la kongreso oni ne demandu pri UEA-aferoj aŭ reciproke; konsilinde kaj nepre sekvide estas bona disigo de la du aferoj. Tio evitas rekopiadon kaj sekve perdon de tempo, ĉar la oficistoj estas ne la samaj.

**Adreso:**

La adreso de la kongreso estas: XVII. Universala Kongreso de Esperanto, 12 Boulevard du Théâtre, Genève, Svislando. Telegramoj: Esperanto, Genève.

**„Esperantista Junularo“**

Organo de UEA-Junularo — bela por infana literaturo — internacia lernejo-servo. Abonprezo po numero 1/2 afranko de letero por eksterlando (jare 8 n-oj).

Administracio: A. Neupert,  
 Wedellstr. 17 - Leipzig-Möckern, Germ.

La plej bela donaco por kristnasko kaj novjaro estas

**Terpophon**

Miniatur-fonografo por domo, sporto kaj vojaĝo.

Terpophon estas:  
 perfekta anstataŭaĵo por granda aparato!  
 Konstruita je uzado de figarba ligno, elegante farita el plej bona polurita nobla ligno.

Terpophon havas:  
 kunsvingantan resonon-plankon, por tio plenan molan kaj tamen fortan sonon.

Dimensioj: 8 1/2 x 10 x 24 1/2 cm. Pezo 1,2 kg.

La plej granda disko estas facile ludebla.

Prezo nur: UŜA-dolaroj 14,5 inkl. pakajo.

Unuaranga orfento por reprezentantoj.  
 Reprezentantoj serĉataj en la tuta mondo.  
 Liverado de ĉiaj muzik-instrumentoj.

**Fr. Falk, Auerbach (Hessen), Germanujo.**  
 Fako: muzik-instrumentoj.

**Internacia Esperanta Ludkartaro.**

Per tiu ĉi heraldike ornamita esp. propagandilo (12,2 x 6,9 cm) estas la plejmulto da kartludoj ludeblaj.

Prezo: unu simpla ludo 4, luksa 5 sv. fk. ĉe 18 ludoj 40% rabato, en afrankita poŝtpakajo de 5 kg.

Postulu senpagan specimenon!

**„IEL“ Kartcentroje**  
**Budapest, Hungarujo**  
 Poŝto 112 kesto 11.

**Anoncetoj.**

Anoncetoj (nur akceptataj por minimume du sinsekvaj presoj) kostas po du presoj kaj po 30 vortoj egalvaloron de 1,80 sv. fk. — Anoncetoj pri korespondado kostas po du presoj kaj po 15 vortoj (ĉrom unu adreso) egalvaloron de 1,20 sv. fk. — Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo, morto, okazontaj gravaj esp. kunvenoj, paroladoj, festoj k. s.) estas senpagaĵoj (unufolia presoj). — Anoncetoj devas alveni 8 tagojn antaŭ sendado.

EDZIĜO. S-ano Anatolij Voloĥov el Tambov (Rusujo) edziĝis kun I-lino Ninjo Kalinenko (malgrandrusino). Famillia lingvo estos Esperanto.

EDZIĜO. S-ano instruisto Kotzer el Baumgarten (dist. Falkenberg, Supra Silezio, Germ.) edziĝis la 18. 11. kun I-lino Käthe Scharke, partoprenantino de esp. kurso en Ottmachau gub. Oppeln.

HELPU BONKORULOJ! Mi havas en manuskripto grandan originalan romanon „Sen titolo“, kiun mi cedos malkare al ĉiu, kiu helpos al mi mone daŭrigi edukadon de miaj infanoj en la urbo. Skribu al J. Ŝirjaev, Baklanka, gub. de Vologda, Rusujo.

**Vojaĝante trans Atlantikon, uzu la ŝipojn de**

**★ RED STAR LINE ★**

Laŭleĝe deviga teksto germanlingva: Verlag und Druck (Bildesejo kaj Preso): T. & H. Jung, Horrem bei Köln. Verantwortlicher Schriftleiter (Respondeca Redaktoro): Teo Jung, Horrem b. Köln.

KIU VOLAS ELDONI la plej bonan verkon de Rabindranath Tagore (La ĝardenisto) tradukitan de mi kun la permeso de l' aŭtoro? Estas vere damage, ke ĉia literatura perlo devas kuŝi manuskripte jam du jarojn kaj ne povas trovi eldoniston. — Edvardo Wiesenfeld, L. K., Varsovio, Polaĵo, Biala 3 [2]

S-INO KLARA ZAMENHOF petas sciigi, ke ŝi estas tre malsana kaj ke pro tio ŝi ne povas respondi la multnombrajn leterojn. [1]

RADIO! TELEGRAFO! POSTO! Mi deziras interŝanĝi ĉiuspecajn il. PK (bfl.) kun eksterlandanoj. Speciale mi ŝatas PK, kiuj prezentas poŝto-, telegrafo- aŭ radio-oficejojn interne aŭ ekstere. E. Kind, telegrafa inspektoro, Del. de UEA, Euskirchen, Oststr. 28/II Germanujo. [2]

GRAVA! Por atingi la enkondukon de l' Esperanto en la ĉi tieajn lernejojn kaj por pruvi al la ĉi tiea publiko kaj urbestro la disvastigon kaj uzon de nia lingvo, ni intencas aranĝi dum marto kiel eble plej grandan esperantan ekspozicion kaj ni urĝe kaj korege petas la internacian samideanaron sendi al ni kiel eble plej multajn esperantaĵojn al il. PK (bfl.) el ĉiuj partoj de la mondo. Ni kvintancos ĉiun sendaĵon per il. PK, se la sendinto deziras! Esperanto-Grupo „Obstine antaŭen“, Euskirchen, Prez.: E. Kind, del. UEA, Euskirchen, Oststr. 28-II (Germanujo). [2]

SIAN ESP. BIBLIOTEKON (tre maloftaj libroj kaj gazetoj grandpartaj binditaĵoj) vendas kaj nomaron nur al seriozaj aĉetemuloj sendas: Iv. Krestianovi, en Pirdop, apud Soŝa, Bulgario. [2]

DANA OFICISTO deziras postenon kiel helpanto en io banka, komerca aŭ teknika branĉo; scias la skandinava germanan, anglan kaj internacian lingvon. Deziras iri al Francujo, Belgio, Holando, Ĉeĥoslovakio aŭ volonte al Svedujo. Ne postulas altan salaron. Ĉu estas veraj esperantistoj, kiuj legas la anoncon? Donu apogon al vera modesta samideano. Volonte li instruos Esperanton al la familianoj. Skribu tuj al Esperanto grupo, delegiino de UEA, Grenaa, landano. [2]

**Korespondado kaj Interŝanĝo.**

Harold W. Kiene, 418 Trinity Place, Philadelphia, Penna. U. S. A., deziras korespondadi, PK aŭ L, kun nesekcia bibliostudentoj. Ankaŭ petas informon de iu pri la akiro de la kompleta esperanta malnova testamento, kie aĉetebla ktp. [2]

Oswald Ulbrich, Ebersbach i. S. 168, Germ., deziras korespondi kun seriozaj geesperantistoj el ĉiuj landoj (L il. PK) pri esp. movado, geografio, naturbelajoj kaj aliaj temoj. Interŝanĝas PM. Ne sendas unue, ĉiam respondas. [2]

S-o Max Sommerer, modelisto, Längenauerstr. 9 Selb, Bavarujo, Germ., deziras interŝanĝi kun ĉiuj landoj PK il. bfl., PM, papermonon, papilionojn kaj aliajn interŝanĝojn, kontraŭ artporcelan-objektoj; certe respondos. [2]

S-o Ludwig Gmeiner, Ansbach, Brauhaustr. 8, Bavarujo, deziras korespondi per il. PK aŭ L kun ĉiuj landoj. [2]

Estimataj samideanoj de tutmondo! Mi deziras korespondi per il. PK (bfl.) Ĉiu ricevos certe respondon! Aloys Huth, Materborn-Cleve, Schulstr. 20, Germ. [2]

Bazilo Averin, Rusujo, Astrahani, Poŝtekvasto 14, Filat. reĝna bileto N-o 165 „ĉerez Uptonomocennogo v. Moskve. Tverskoj bul. 12.“ Interŝanĝas PM kaj papermonojn. (Ne sendu germanajn kaj ĉeĥoslovakajn PM!) Sendu kvankam 1000 pecojn sed ne sendu pli ol 10 pecojn de la sama speco, alie oni konfiskos vian sendaĵon! Mi respondas ĉiam. [4]

Ĉu iu azia viro aĉ virino, juna aŭ maljuna, volas korespondi kun sveda sinjorino pri religiaj aŭ seriozaj aferoj? S-ino Henny Widström, Tegen 4, Lidingsvillastad apud Stockholm, Svedujo. [2]

La anoj de „Esperanto-Bildungsverein Supren“ interŝanĝas PM, PK il, bfl., L kun la tuta mondo. Wien VII., Kaiserstr. 56 (Kaffee). [2]

S-o J. I. Piet, Willemstraat 95, Eindhoven, Nederlando, deziras interŝanĝi PM kaj tutaĵojn. Korespondas esperante, angle, germane, france, holande. Sendu nenion, skribu unue. [2]

Mi deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Kolektas PK il S-o Ake Liljestrand, Karlslundsgatan 9, Örebro, Svedujo. [2]

S-o Horváth Francisko deziras korespondadi kun ĉiuj landanoj. PK, PM. Adreso: Szombathely, Alsó hegy, Hungario. [2]

Pirna a. E., Germanujo, Gartenstr. 32, s-o Paul Glöckner komercinstruisto, serĉas korespondantojn por si kaj siaj 34 gelnantoj. [2]

S-o Oskar Schädlich, Neu-Gasse 1, Zwickau-Schedewitz i. Sa., Germanujo, deziras interŝanĝi PK il., L, gazetojn ktp. kun tuta mondo. Respondos nepre. [2]

Richard Gerhard Börner, Dresden-A., Poststr. 21, prezentigas per li aĉeton de ĉiuj germanaj komercaĵoj. [2]

J. B. E. de Koster ŝanĝas PK il. kaj PM. Daltonstraat 98, Den Haag, Holando. [2]

F-lino, poŝtoficistino, 21 jara, deziras interŝanĝi per il. PK kaj L kun gesamideanoj. Bonvolu skribi, nepre respondu! Latvio, Rujene, Pasta Kantori, Jaunrabla. [2]

Bulgarujo, Pleven — kv. 8, ul. 4, n-o 51, N. D. Iskoskov — deziras korespondadi kun tuta mondo, ĉiam respondas. Interŝanĝas papermonojn, naciajn esp. gazetojn, il. PK, PM ktp. [2]

S-o Zeley Ferenc, Szolnok, Városháza (Hungarujo), deziras interŝanĝi PM, respondos nepre. [2]

S-o H. Sobel, lernejestro, Ned. Mettray, Eefde, Nederlando, deziras korespondadi pri edukado kaj framasonismo per il. PK bfl. kaj precipe L. [2]

S-o Joseph Maier, studprofesoro en Neumarkt Opf., Bavarujo, Germanujo, deziras korespondi kaj interŝanĝi kun eksterlandanoj. Mi promesas ĉiaman kaj certan respondon. [2]

S-o Kaizo Fukuta, Yakusen, Tojama, Japanujo, deziras interŝanĝi PK il., PM tra la mondo. Preferas kun Ameriko, Afriko, Turkujo, Kubo, Grekujo. [2]

Fraŭlo Viktor Van Beylen, artpentristo, Groote Markt 50, Antwerpen (Belgujo), deziras korespondi per PK kaj L pri ĉiuj interesaj temoj kun gesam-oj el ĉiuj landoj. [2]

S-o R. Schönwälder, Hermannseifen, Bohemio, deziras korespondi kun gesamideanoj en malpli proksimaj landoj. Mi celas ĝoigi miajn gekursantojn per sciigoj pri landaj aferoj. Ankaŭ biletkartoj, poŝtkartoj k. a. dezirataj. Al ĉiu ni respondas. [2]

Mi deziras korespondi kun la tutmonda „Boy Scouts“ organizacio kaj precipe interŝanĝi fotografojn el ilia vivo. Sendu kaj skribu al Stanimir Popadić, skoltmastro, Stari Beĉej, Jugoslavio. [2]